No. 5.

# BULTENO

1934. 13. IX.

## DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefona n-ro 718-41.

Redaktas: Dr. ST. KAMARYT Dr. A. PITLÍK

Senpage por membroj de Ĉs. Asocio Esperantista. Aperas sesfoje dum la jaro.

## Jubileo de 10-jara ekzisto de Esperantista Klubo en Kolín,

en kies kadro okazos

# REGIONA LABORA KONFERENCO

### de centro- kaj orientbohemaj esperantistoj en Kolín

**sabaton la 29-an de septembro 1934 kaj dimanĉon la 30-an de septembro 1934.**

P R O G R A M O:

**Sabaton vespere** la 29.IX.1934: Je la 20-a horo en hotelo „Lidový dům" apud urba domo sur ĉefa placo. (De stacidomo veturas aŭtobuso por 1·— Kč.) — *Interkonatiĝa vespero.* Starigo de detala programo por labora konferenco. Dancemuloj povos post la kunveno viziti dancejon.

**Dimanĉon matene** la 30.IX.1934 en urbestra kunvenejo de Palacký en urba domo. Je la 8·30 horo: *solena ĝenerala kunveno* de Esperantista Klubo en Kolín. Je 9·30 h. en la sama ejo: *Labora konferenco.* Diskutotaj estos ĉiuj aktualaĵoj en la esperantista movado en ĈSR kaj en la mondo.

(Proponoj povas esti sendataj al prezidanto de ĈAE dro St. Kamaryt, Bratislava, Zochova 3.)

Je la 12-a horo en hotelo „Lidový dům": *komuna tagmanĝo, poste fotografado antaŭ urba domo.*

Posttagmeze je la 14-a horo: *promeno tra la urbo.*

**Prezoj:** konferenca kotizo 5·— Kč, tagmanĝo dimanĉon 30. IX. 6·50 Kč, unulita ĉambro 12·50 Kč aŭ 11·— Kč, dulita ĉambro 25·Kč aŭ 22·— Kč.

Anoncu laŭeble plej rapide al s-ro Jan Janda, Kolín, Komenského 194 per simpla poŝtkarto vian aliĝon kun jenaj indikoj: 1) tago kaj laŭeble horo de alveno, 2) ĉu dezirata ĉambro unu- aŭ dulita kaj por kiu prezo (vidu supre), 3) ĉu vi partoprenos komunan tagmanĝon. Vi ricevos pagilon, per kiu bonvolu tuj sendi la indikitan sumon. Nur tiel vi ebligos senriproĉan administradon de la konferenco. Al eventualaj demandoj, kiuj estu plej koncizaj, aldonu respondan afrankon.

Esperantista Klubo Kolín.

Ni invitas plej kore kaj insiste la samideanojn, ke ili uzu la nun ne ofte prezentiĝantan okazon kunveni kun la esperantistaj amikoj, aŭdi interesajn kaj gravajn raportojn de niaj laborantoj, paroli kun ili kaj interkonsentiĝi, ĉerpi fortojn por nova agado, sed ankaŭ interparoli senĝene kaj amuzi esperante.

Kolín estu dum la 29. kaj 30. septembro celo de ni ĉiuj. Aliĝis jam komitato de ĈAE, la Esperantista klubo en Praha preparas grandan karavanon al festo de la frata klubo.

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.

Josef Štolba, direktoro de la Urba muzeo:

# Kolín.

Riĉaj antaŭhistoriaj trovaĵoj de Urba muzeo en Kolín nepre dementas la malnoviĝintan famon, kvazaŭ Kolín estus fondita de Přemysl Otakar II-a. Male ekzistas firma pruvo pri tio, ke tiu ĉi antaŭvidema reganto por plifortigo de sia reĝa potenco, minacata de kuraĝaj vladikoj kaj riĉaj monaĥejoj, ordonis konstrui sur malnova, de miljara tradicio sanktigita komerca centro, urbon fortikan kaj loĝigis ĝin per sia fidela popolo.

Abundaj arkeologiaj elfosaĵoj pruvas, ke Kolín kaj ĝia proksima ĉirkaŭaĵo estis jam en malnova ŝtona epoko loĝata. Ekzistas ankaŭ gravaj trovaĵoj de romana deveno trovitaj moneroj antikvaj nerefuteble atestas, ke jam en epoko ĉirkaŭ la kvara jarcento antaŭ Kristo floris en komunumo Kolín komerco.

„Reĝa urbo Kolín“ restis al tiu tradicio fidela, kaj kiam Přemysl Otakar II-a en la dua duono de XIII-a jarcento en ĝiajn fortikaĵojn loĝigis germanajn metiistojn kaj loĝantojn el Rejna regiono, li donacis al la urbo privilegiojn plejparte de komerca karaktero. Post li faris same ankaŭ liaj posteuloj. Ĉi tiel la komunumo Kolín fariĝis pli kaj pli grava centro komercista kaj metiista.

Dum regado de Otta de Brandenburg fartis Kolínanoj same kiel loĝantoj en aliaj urboj en Bohemujo malbone. Nur kiam eksidis sur tronon de siaj antaŭuloj Václav II-a, li protektis Kolínanojn en jaro 1285 kontraŭ nobelaro kaj ordonis, „ke urbanoj havantaj proceson kun personoj nobelaj kaj kavaliraj, serĉu justecon sole ĉe la reĝo mem“.

Jan Luxemburg ne estis komence al Kolínanoj tre favora, ĉefe pro ilia nekomplezemo, ke ili rifuzis al li eniron en urbon, kiam li marŝis al Praha. Li senigis ilin de „rajto magazena kaj dogana“ kaj pridonacis per tiuj rajtoj la urbon Nymburk. Nur 31-an de decembro 1310 li plenumis la petojn de Kolínanojn kaj redonis al ili privilegiojn, proklaminte „ke la urbon al neniu li donos“ kaj permesis 14-tagan foiron je Sta Bartolomeo. Tiu ĉi reĝo komencis konstrui la preĝejon de Sta Bartolomeo. Ĝin finis lia filo Karolo IV-a sub gvido de Petr Parléř en j. 1378.

Imperiestro Karolo IV-a estis al Kolín tre favora. Li havigis al urbo grandajn faciligojn en pago de impostoj, donis al ĝi rajton postlasi la heredaĵon al iu ajn kaj en la jaro 1363 „rajton de lignotenejo“. Lia sekvanto Václav IV-a starigis en Kolín regionan ekzekutejon, aprobis la semajnajn foirojn kaj en 1391 ordonis, „ke unu mejlon ĉirkaŭ la urbo ne estu drinkejoj kaj metiistaj laborejoj“. Ĉe tiuj ĉi favoraj kondiĉoj floris komerco kaj metioj. Aspekto de la urbo, malgraŭ oftaj fajroj, estis bela kaj riĉeco de loĝantoj kreskis. Ĉirkaŭaj plugkampoj portis riĉan rikolton, estis kulturataj vino, lupolo, hordeo, bierindustrio floris, dia beno de ĉiuj flankoj direktis sin en la urbon. Tamen gravaj malfeliĉoj trafis Kolínanojn dum husanaj militoj. Pro gvida politiko de kolínaj germanoj tenis sin Kolín ĉe reĝo Zikmund kaj kiam tiu ĉi post malvenko ĉe Vítkov devis retiriĝi en Hungarion, venis venĝo de venkinto. Prahaanoj venkis Kolín kaj bruligis monaĥejon dominikanan. En la jaro 1427 la duan fojon kolínaj germanoj aliĝis al partio de Zikmund, en Kolín estis eĉ iniciatita plano pri mititakiro de Praha — kaj tial Prokop Veliký sieĝis Kolín kaj venkinte ĝin, ekzilis rezistajn germanojn. Kolín eniris sub administron de la hetmano Jan Čapek el Sány.

La 7-an de majo 1421 aliĝis Kolínanoj al Prahaanoj kaj deklaris, „ke ili Zikmundon kiel regnestron ne rekonas, ke ili volas Dian veron laŭ kvar artikoloj defendi“. Tiamaniere fariĝis Kolín urbo husana kaj de tiu tago oni komencis en urba domo ofici ĉeĥe.

Post batalo ĉe Lipany akiris de Zikmund, hetmano astro Bedřich el Strážnice por si enregistron sur Kolín de 3.000 groŝaj sesdekoj kaj per tio fondiĝis bienego de Kolín. Pastro Bedřich konstruis poste sur loko de forbruligita dominikana monaĥejo kastelon kaj de li ankaŭ estis konstruita verŝajne la „garda turo“ sur roko en Zálabí, ĉar la unua skriba mencio pri ĝi estas el jaro 1448.

En 1458 transiris bienego de Kolín en manojn de Georgo de Poděbrady kaj nur de lia filo Viktorín elaĉetis ĝin reĝo Vladislav. De reĝo Ludvík en j. 1519 estis redonita tiu ĉi bienego al reĝa ĉambro kaj la urbo fariĝis denove „reĝa urbo“.

Vladislav Jagellovec montris al urbo grandan simpation kaj dum regado de tiu ĉi reĝo revenis en urbon denove trankvilo kaj paco. Malzorgitaj profesioj kaj metioj rekonsciiĝis, mastrumo pliboniĝis, estis starigitaj denove vinberejoj kaj lupolejoj. Gildoj metiaj protektis metiojn, kiuj floris kaj potenciĝis. Ruinigitaj fortikaĵoj estis laŭorde riparitaj, konstruita nova urba domo, sur ambaŭ preĝejaj turoj donitaj novaj tegmentaj trabaroj, en j. 1504 estis konstruita nova sonorila turo.

Dum regado de Ferdinand I-a akiris fundon doktrino luterana kaj tial Kolínanoj aliĝis al opozicio de ĉeĥaj regantaj klasoj kontraŭ la reĝo. Post batalo sur Bílá Hora malfacile portis Kolínanoj tiun ĉi venkon. Ĉiuj iliaj bienoj kaj havaĵoj estis konfiskitaj, opozicion de nekatolikoj rompis kastela hetmano Jan Gryzl el Gryzlov, tiel ke foriris el urbo 44 familioj kaj iliaj havaĵoj en valoro de 9.790 groŝaj sesdekoj estis konfiskitaj. Brulegoj en j. 1568—1597, pestaj batoj 1582, 1598 kaj 1609 kaj svedaj militiroj finis verkon de pereo, tiel ke interne en urbo restis sole 62 domoj kun 1.300 loĝantoj.

En j. 1660 mortigis multajn homojn disenterio kaj en j. 1680 denove pesto postulis 503 personojn kiel viktimon.

Mallonga tempo de 80 jaroj ne sufiĉis, por ke Kolín rekonsciiĝu de batoj, kiujn al ĝi donis militoj, brulegoj kaj pesto kaj jam denove milito pri habsburga heredaĵo dum regado de Maria Terezia danĝere premis sur Kolín.

En j. 1742 kaj 1745 sidiĝis ĉi tie Prusoj, ankoraŭ pli multe suferis Kolín dum la Sepjara milito. Fino de tiuj ĉi turmentoj venis la 18-an de junio 1757, kiam Daun venkis en batalo ĉe Křečhoř la armeon de Frederiko. Tiu ĉi batalo postlasis al Kolín memorindan kanton „Kolíne, Kolíne, stojíš v pěkné rovině“. (Kolín, vi staras sur bela ebenaĵo.)

Josef II. forigis 1785 la oficon de imperiestra urbestro kaj tuta potenco estis cedita al purkmistro kaj du konsilistoj de magistrato. En tiu-ĉi tempo reviviĝis denove metioj kaj komerco; enloĝiĝis ĉi tie multaj germanaj metiistoj, per kio estis la ĉeĥa karaktero de urbo konsiderinde tuŝita; la antaŭurboj restis pure ĉeĥaj.

Epoko revekiĝa progresis ĉe ni kun siaj devizoj prospere; paŝon post paŝo, de viro al viro, patriotoj propagandis nacian spiriton. Juna entuziasmulo, stu-

dento Rubeš, komencis aranĝi teatrajn prezentadojn kaj kunvenojn kaj fondis ĉe Veil la unuan ĉeĥan librovendejon. Depost 1848 staris Kolín ĉiam antaŭe ĉe ideo nacia.

En 1840 estis fondita societo de teatroamatoroj, en 1859 societo kantista, en 1862 gimnastika unuiĝo Sokol.

Ne unufoje dum oficado de aŭstria ministro Bach estis kontraŭ Kolínanoj sendita soldataro pro ilia radikala ĉeĥa konduto kaj iliaj ĉeĥaj malmolaj kapoj. Tiam ne ŝajnis esti plu en Kolín aŭstriaj regatoj, sed memkonsciaj civitanoj, kiuj estis pretaj stariĝi en decidan batalon por rajtoj de sia nacio.

Memkonscio nacia havis kompreneble fundamenton kaj grandan apogon en ekonomia progresado de tuta regiono. Malnovaj gildoj ja malaperis, sed metiistoj fondis por si en j. 1872 novan ligilon, la „Metiistan asocion". La ekonomia vivo iris jam novan vojon. Kolín komencis iom post iom ŝanĝiĝi al industria urbo. Arterio de ekonomia vivo fariĝis en j. 1845 la ŝtata fervojo. En 1864 estis fondita kompania sukerfabriko, en 1870 sukerfabriko de kavaliro Horský, en 1871 fondita akcia fabriko de artaj sterkaĵoj kaj ĥemiaĵoj. En la sama jaro estis renovigita kastela bierfarejo. Kiam en 1870 estis malfermita nova linio de nordokcidenta fervojo, granda nombro de industriaj entreprenoj kreskis de jaro al jaro. Ĉirkaŭ la naŭdeka jaro de pasinta jarcento helpe de ĉeĥa kapitalo kaj precipe de loka komercistaro ekestis tri rimarkindaj entreprenoj: cikorifabriko, petrolrafinerio kaj veturilfabriko. Hodiaŭ ĉirkaŭ 70 fabrikaj kamentuboj altiĝas al ĉielo kaj la fervojo el Kolín al kvin direktoj disveturigas produktojn de ĉi tiea kapabla industrio al ĉiuj partoj de la respubliko, sed ankaŭ al malproksimaj lokoj de Eŭropo kaj transmaro. La urbon Kolín oni nun prave nomas „bohema Manchester". Apud nomitaj uzinoj estas ĉi tie ankoraŭ sekvantaj ĝenerale konataj fabrikoj: Akcia fabriko por purigo kaj prilaboro de potaslesivoj, granda alkoholfabriko kun alkoholrafinerio, ĥemia fabriko de firmo Jakl a Škeřík, feĉofabriko, grandaj elektrejoj, du sukeraĵ- kaj ĉokoladfabrikoj, kvar presejoj, kablofabriko, gasfabriko, du ŝufabrikoj, fornofabriko American Heating, radio- kaj telefonil-fabrikejo, pliaj metallandejoj, maŝinejoj, brikejoj, cementaĵejoj k. t. p.

Kresko de komerco kaj industrio sekvigis eĉ devenon de multaj moninstitutoj. En jaroj 1865 estis fondita monpruntejo Občanská záložna, 1894 eniris en la vivon Městská spořitelna (urba ŝparkaso), kiu evoluiĝis al la plej grava instituto inter la ĉeĥaj ŝparkasoj. Kamparana ĉirkaŭaĵo kaŭzis en j. 1868 fondon de Hospodářská záložna (Terkulturista monpruntejo). Poste alviciĝis al nomitaj moninstitutoj: Záložna živnostenská, Středočeská záložna, Záložna lidová. Grandaj ĉeĥaj bankoj Živnostenská, Anglo-československá a Pražská úvěrní, Legiobanka, Moravská banka, havas en Kolín filiojn. Kolín estas ankaŭ sidloko de filio de Nacia banko ĉeĥoslovaka.

Al kampistaj, komercistaj kaj socialaj celoj servas grandnombraj kooperativoj, kiel laktaĵprodukta, grenkaj fruktodeponejo, aĉetcela, vendcela k. t. p. En j. 1913 komencita reguligo de rivero Labe per finkonstruo de nova ponto proksimiĝas al sia fino. Navigebleco de Labe fariĝos granda apogo de ĉi tiea industrio kaj samtempe okazo por evoluo de pluaj branĉoj.

Lernejaro en Kolín estas en konstanta evoluo. El malnova ĉefa lernejo devenis reala lernejo, kiu poste estis ŝanĝita je reala gimnazio, el metiista lernejo evoluiĝis granda landa industria lernejo, apud komerca duklasa lernejo estas komerca akademio, por knabinoj estis fondita familia lernejo por virinaj profesioj, en lastaj jaroj konstruita lernejo agronomia. Por mezjara junularo havas Kolín 4 lernejojn burĝajn, 4 elementajn, 6 fakajn kompletigajn lernejojn kaj 2 lernejojn porinfanajn (patrinajn). Belaj, kelkaj eĉ lukse konstruitaj lernejaj konstruaĵoj atestas pri granda amo de civitanaro al lernejo.

Al celoj ĝenerale klerigaj kaj sciencaj servas abunda (20.000 voluma) komunuma biblioteko kunigita kun legejo kaj porinfanaj biblioteko kaj legejo, urba muzeo kun eminentiĝantaj kolektoj antaŭhistoria, etnografia kaj numismatika, plue multnombraj societoj kaj kluboj: Regiona popolkleriga korporacio, klubo de ĉsl. turistoj, de fotografo-amatoroj, de esperantistoj, Artista fako de A. F. K., filharmonio, societoj kantistaj, gimnastikaj, sportaj ktp.

La malbonfama mondmilito interrompis — sed nur por mallonga tempo — la evoluon de la urbo. Depost la revolucio en 1918 zorgas civitanoj de ĉiuj politikaj partioj fari sian urbon progresema kaj kultura centro, pri kiu oni povus esti fiera. En unua vico oni forigis grandparte loĝejan krizon per konstruo de multaj domoj, dediĉis sin al lernejaj kaj kulturaj bezonoj de civitanoj kaj fine kronis sian laboraĵon per aranĝo de granda kanaliza kaj akvotubara reto.

Hodiaŭ nombras Kolín ĉirkaŭ 20.000 loĝantojn en 2270 domoj. Kresko de loĝantaro depost revolucio estas 3000 homoj, depost jaro 1919 estis konstruitaj 730 novaj domoj. Same, kiel la filoj de Kolín metis sin efike sur ĉiuj frontoj en batalon por liberigo de sia ŝtato, tiel ankaŭ Kolín en la nova propra ŝtato per sia saĝa administrado kaj penado stariĝis inter modernaj urboj, kiuj komprenas la hodiaŭan vivon kaj scias al ĉiuj demandoj de la tago doni sian propran respondon en formo de nova laboraĵo.

La fortiĝo kaj ekfloro de urbo estis farita nur de lokaj faktoroj, per propra forto kaj propra klopodemo. Jen veraj, sanaj fundamentoj de venonta kresko kaj floro de la urbo Kolín.

Laŭ Almanako de urbo Kolín tradukis Jan Janda.

### Kelkaj famaj Kolínanoj.

La poeto *Karel Leger* naskiĝis 21. IX. 1859 en bieno n-o 24 en strato Legerova en Kolín. Li mastrumis tie depost la jaro 1881 ĝis sia morto 5. IV. 1934. Lia ekzemplo estis la naciaj bardoj Čech kaj Vrchlický. Scenejo de liaj multaj romanoj, verse kaj proze, estas ĉeĥa kamparo, precipe Kolín.

La poeto *Jan Svatopluk Machar* naskiĝis la 29. II. 1864 en Kolín. Lia naskiĝdomo staris ĉe krucvojo de stratoj Tyršova kaj Fügnerova. Sur domo de MUDr. Mendl estas fiksita memortabulo. Funda trajto de liaj poemoj kaj prozo estas kritikemo. Li scias ĝuste trarigardi kaj prijuĝi ĉion, kio estas malbona. Lia literatura laboro estas tre abunda.

*Václav Radimský* naskiĝis 1869 en Kolín, studis mezan lernejon, dediĉis sin al arto pentrista kaj fariĝis sekvanto de majstroj Barbizonaj. La urbon Kolín li bildigis sur triptiko kaj tiu verko ornamas urbestran „kunvenejon de Palacký" en la urba domo.

*Jan kaj Václav Drobník*, fratoj naskiĝintaj en Kolín (Jan 1876—1924, Václav 1893—1924) disĉiploj de majstro Myslbek. Jan Drobník estas kreinto de monumentoj de Fr. Kmoch, de militfalintoj el Kolín kaj de multaj aliaj en Kolín kaj ĉirkaŭaĵo.

*Rudolf Mazuch* naskiĝis la 29. VIII. 1891 en Pardubice, mortis 8. II. 1920 en Kolín. Li estis lerninta fotografisto, post ekzameno li fariĝis en j. 1911 lernanto de akademiaj belartoj en Praha. Mazuch estis figuralisto kaj pentristo de pejzaĝoj per sento impresionisma. Li postlasis diversajn laborojn, kiujn eldonas la klubo A.F.K. Kolín.

**Ekspozicio de libroj** kun eblo aĉeti funkcios en Kolín dum la konferenco.

## Rezultato el Stockholm.

La raportoj pri traktadoj de la kongreso, de la konsilantaro kaj la komitato de UEA en Stockholm estas tre malkontentigaj. La kunvenoj preferis drastan decidon al la kompromisa solvo. Rezultis anonco de rezigno de pluraj gvidaj personoj de UEA, inter ili la ĝisnuna honora kaj aktiva prezidanto Stettler. Nova prezidanto estis elektita s-ro Bastien, franca generalo-intendanto en pensio, konata precipe pro sia Etimologia vortaro 9-lingva. Definitiva juĝo estos ebla nur post studo de detalaj oficialaj raportoj. La tasko de la nova gvidantaro estos ankoraŭ pli malfacila ol de la estinta. Estas tre bedaŭrinda la stranga fakto, ke post tiom surpriziga kaj neregula novaranĝo ricevis ĝis nun neniu el koncernaj lokoj en nia lando iajn ajn informon aŭ klarigon oficialan aŭ privatan. Nek nia asocio, nek UEA-teritoria oficejo, nek nia prezidanto, elektita laŭdire UEA-estrarano, ricevis iun ajn konfirmon pri okazintaĵoj aŭ instrukcion, kio estas farota laŭ opinio de la novaj gvidantoj en la nuna momento. La solaj fontoj de niaj informoj estas raportoj de Heroldo, kiuj laŭdire estas laŭveraj, sed ne malkaŝas kontentecon pri la renverso. La ne tro spritaj parodioj en la Pirato ne trovas nian aprobon. Mallonga deklaro de la nova UEA-prezidanto en Nia gazeto parolas pri ŝparigaj decidoj de la nova komitato ne klarigante la akceptitajn aŭ proponatajn ŝparmetodojn. Se temos pri simplaj malgrandigoj de salajroj aŭ nombro de oficistaro, ni dubas, ke rezultos el tio plibonigo de la situacio. Tial ni povis fari ĝis nun neniajn decidojn kaj rekomendas al nia membraro paciencon kaj fidon. Ni ne konsilis al la eksperimentoj kondukintaj al la Stockholmaj disputoj. Ni daŭre fidas je bezono, ebleco kaj utilo de internacia organizo. Ni daŭre estas pretaj kunlabori ankaŭ en la nova sistemo, se ĝi estos kapabla liveri taŭgan helpon kaj respektos nian Asocion laŭ ĝia graveco.

## Esperantista vivo.

Mortis **s-ino Weisskopfová**, edzino de nia dumviva membro s-ro Mořic Weisskopf en Praha. Sinceran kondolencon!

**MUDr. Adolf Bischitzky** mortis la 30-an de aŭgusto 1934. Ni ĉiuj funebras pro morto de tiu ĉi eminenta homo, multjara pioniro de esperanto inter germanoj. Li naskiĝis 18-an de novembro 1871 en Dříš (Bohemio). Fariĝinte baldaŭ esperantisto li estis fidela kaj persista laboranto ĝis sia morto. Jam en j. 1908 li fondis kun prof. Lederer kaj inĝ. Jul. Boschan por germanoj en Praha Esperantan Unuiĝon Verda Stelo. Unua prezidanto estis prof. Lederer, post lia morto en 1911 Bischitzky ĝis sia morto. Lastan fojon li estis reelektita 1-an de marto 1934, jam malsana. Li multon verkis. Estas de li tradukitaj Marie Magdalena de Hebbel, Suferoj de juna Werther de Goethe, La aliformigita driado de H. Salus. Kunlaboris en Int. medicina revuo, Marto k. a. Sed krom en nia movado li partoprenis aktive ankaŭ en aliaj humanismaj movadoj: unuiĝo de liberpensuloj, komisiono por konsilado al junularo, Ĉeĥoslovaka ligo por homaj rajtoj, kies li estis prezidanto. La klera kaj nobla homo mortis.

**Diplomon inĝenieran** akiris nia membro s-ro František Smeták, profesoro de Komerca akademio en Hradec Králové. Koran gratulon!

**Kaŭĉukan stampilon** kun via adreso 50x13 mm (maksimume 3 liniojn) liveras por 16 Kč afrankite la sekretariejo de ĈAE. Samtempe kun via mendo sendu la pagon al poŝtĉeka konto n-o 12.371 (Svaz čs. esperantistů, Ústřední kancelář, Praha).

### Radio-kurson de esperanto,

gvidatan de T. Kilian el Brno sendos ĉiuj ĉeĥoslovakaj stacioj krom Bratislava depost 2. oktobro ĉiun mardon kaj vendredon inter la 19·15 ĝis 19·30 horo. Enkonduka parolado pri „Plej klera nacieto" la 28an de septembro je 19·40 horo. Disvastigu ĉi tiun informon kaj zorgu, ke la kurso estu aŭskultata!

**La eldono de tiu ĉi speciala numero estis finance ebligita de Esp. klubo en Kolín.**

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík. - Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. - Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933 - Podací úřad Praha 45.